

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

— kio estis, kiel estas en Esperanto-Muzeo Jokohama —

Intervjuo fare de “La 39a Komuna Seminario”

En la 13a kaj 14a de novembro okazis “la 39a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea kaj Vjetnama Junularoj” (KS), ĉi-jare tute rete de japana teamo. En unu el la programeroj nomata “Esperanta Turismo”, 3 teamanoj de la KS vizitis kelkajn lokojn ĉirkaŭ Tokio: 2 rilataj al Esperanto kaj 2 ne rilataj. En tiu rilata loko estis elektita nia Muzeo. En la 14a posttagmeze, estis videa intervjuo ĉe la Muzeo ĉirkaŭ unu horo, kaj tiu intervjuo estis resumita en 12 minutoj, kaj dissendita vespere de la 14a de novembro.

En la dissendita intervjuo estis jenaj aferoj:

Kia urbo estas Jokohamo? Kio estas la celo de la Muzeo? ktp, kun la scenoj de la ekstero de la muzeo, ekspozicio, librobretoj ktp.

En la ne dissendita parto, ni Esperanto-Muzeo Jokohama demandis s-ron Sato Rjusuke, unu el la intervjuitoj kaj instruisto de la japana kaj Esperanto en ĉina universitato kun Esperanto-Muzeo, kia estas la ĉina muzeo. S-ro Sato inter alie respondis, ke s-ro Semio, la respondeculo opinias, ke oni ne devas forigi kolektitajn librojn, eĉ se ili estas duoblaĵoj. Aŭdinte tion, s-ro Doi Hirokaz, nia gvidanto de la Muzeo donis plenan interkonsenton.


Ŝtuparo kun kongresaj sakoĵoj

En nia muzeo estu ne nur libroj! Vidu la foton de la muro ĉe la ŝtuparo. Tie pendas kongresaj sakoĵoj.

Ni danke akceptos aliajn kongresajn memoraĵojn. Antaŭdankon!

Vivkondiĉoj plibonigitaj

Tiu ĉi domo, kiam aĉetita, ja havis elektraĵojn lumojn kaj klimatizilojn. Ni renovigis iom el ili. La domo havas gasfornon en kuirejo, sed ĉar ni ne intencas kuiri, ni ne abonas gasservon. Ni tamen dezirus trinki kafon aŭ teon, aŭ malvarman sukcon. Tial ni havas kafmaŝinon, mikroondan fornon kaj malgrandan fridujon.



Trezoro de Muzeo

Jarkolektoj de “La Revuo”

“La Revuo” estas monata literatura gazeto, tute Esperantlingva kaj eldonita en Francio de 1906 ĝis 1914. Nia muzeo, dank’ al oferto de s-ro Mine Yositaka (pere de s-ro Gotoo Hitosi), posedas ĉiujn numerojn (vidu la foton de la kovrilo de la unua numero). La gazeto estas kunlaborita de L.L. Zamenhof, kaj fakte enhavas liajn verkojn. Ekzemple, la traduko de “La Revizoro”, komedio de Gogol, tradukita de L.L. Zamenhof, aperis en tiu ĉi gazeto por la unua fojo.



La knaboj de Jakoo (2) (矢向の少年たち)

Tanigaŭa Hiroŝi

Bruldifektita “poemo”

Iun vesperon (feb. 1999) du knaboj subite venis al Aktiva Centro de Jakoo (loka centro de sporto kaj kulturo) kaj diris; “Donu al ni krajonon kaj paperon. Ni skribos poemon.” Iom surprizite kaj ĝoje mi donis al ili krajonon kaj paperon.

Post ĉirkaŭ 40 minutoj la knaboj donis al mi respektive “poemon”. Ili skribis:

Knabo M.D. : “Mi nun estas nur frivolulo, sed reale estas tute alia ol la banalaj donjuanoj...”

Knabo S.K.: “Mi neniam forĵetos mian volon. Mi travivos neniom kompromise...”

Unualege mi kortuŝiĝis. Ili plenforte afektas sin fortuloj. “Vireca ulo mi estas!” Pene ili demonstracias. En tiuj vortoj mi sentas ilian profundan incitiĝon kaj malĝojon pro la severa fremdeco en la lernejo, kaj malfacilaj familiaj cirkonstancoj. Responde mi skribis:

Al la knabo M.D.: “Mi scias, ke vi havas varman koron en vi. Sciu, ke vere vireca viro estas tia viro kia estas kara al malfortuloj...”

Al la knabo S.K.: “Via vervemo atentindas. Sed kiam vi foje retiriĝos unu paŝon, vi trovos novan vojon”.

Ĉirkaŭ unu semajnon poste knabo Ŝ.T. venis kaj donis al mi paperpecon dirante: “Ĉu vi legos ankaŭ la mian?”

La papero de la “poemo” estis bruldifektita. Verŝajne li ŝanceliĝis, ĉu doni la “poemon” al mi, aŭ forbruligu ĝin? La postsigno de la bruligo simbole montris la profundan ĉagrenon de lia

interno.

Li skribis: “Ĉio ne bonorde iris. Forĵetinte eĉ duonon de mia revo, ne aŭskultante mian patrinon, mi nur laŭplaĉe faradis multon. Ĝis nun mi estis kontenta. Sed lastatempe mi ekpensis: Mi kulpus. Povas, ke mi atribuis mian malkontenton al mia patrino aŭ al mia revo mem.... Domaĝege estas, ke mi ne povis streĉi cele al mia revo. Mia vojo! Propre propra vojo mia!”

Mi responde skribis al li: “Kortuŝe mi legis vian ‘Mia vivmaniero’n. Via koro ŝanceliĝas. Vi serĉas vian vojon. Kaj nun vi estas ekironta al nova ŝtupo. Sur la propra via vojo. La ‘bruldifekto’ estas elmonro de via ŝanceliĝo. Kiam vi foje haltos, vi trovos iom pli vastiĝintan koron... Mi subtenas vin en mia koro.”

